



PILO-PRESS

Internacia

Informservo



Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 4/1975 - 27 jan 1975
Aperas ĉiusemajne

Aligu al la 53a
GEK en Oberkirch

Oberkirch atendas vin - Dua kongresa bulteno

Oberkirch (pp) La 53a Germana Esperanto-Kongreso okazos en Oberkirch dum pentekosto 1975, de la 17a ĝis la 20a de majo. Ĉefa temo de la kongreso estas "ESPERANTO-TURISMO".

Programo

Sabaton, la 17an de majo 1975

- 13.00 horo Kunsido de estraro kaj konsilantaro de GEA
- 14.00 horo Akcepto de la urbo
- 14,30 horo Malfermo de la ekspozicio
- 14,45 horo Ĵurnalista konferenco
- 15,30 Malfermo de la kongreso
Podia diskutado - publika, germanlingva
(Komuna aranĝo de GEA kaj de Ludwig-Zamenhof-Gesellschaft)
- 20,00 horo Balo

Dimanĉon, la 18an de majo 1975

- 9,00 horo Ekumena diservo
- 10,00 horo Jarĉeefkunveno de GEA

Posttagmeze: Laborkunsidoj

- a) Ludwig-Zamenhof-Gesellschaft
- b) Germana Esperanto-Junularo
- c) Germana Esperanto-Instituto
- d) pri Informado
- e) AGEI - instruistoj
- f) IEKA - aŭtomobilistoj
- g) Naturamikoj

20,00 horo Kultura programo

Lundon, la 19an de majo 1975

- 9,30 horo Duontagaj ekskursoj
 - a) migrado
 - b) aŭtobusa ekskurso
- 12,30 horo Komuna kunestado

Mardon, la 20an de majo 1975

- 9,30 horo Tuttaga ekskurso per aŭtobusoj tra Nigra Arbaro kaj Ŝvaba Ĵuraso

Kotizoj: Kongresan(in)o 23,-- GM
Edz(in)o 15,-- GM
Studento/lernanto
ĝis 25jara 15,-- GM

Pri la kostoj de la ekskursoj la aliĝintoj ricevos apartan informon.

Pagojn bonvolu sendi al la jenaj kontoj: Esperanto-Gruppe Oberkirch e.V., Deutsche Bank AG, Filiale Oberkirch (BLZ 664 700 35) Konto 701 227 - Postscheckamt Karlsruhe Konto 473 31-757
Kongresa adreso: Esperanto, 7602 Oberkirch, Lohmühlweg 1

Internacia Junulara Renkontiĝo en Luksemburgo

Luksemburgo/Münster (pp) Kunlabore kun la Luksemburgia Esperanto-Asocio kaj ties aktiva junularo Germana Esperanto-Junularo okazigas sian tradician printempan renkontiĝon paske de la 27a de marto ĝis la 1a de aprilo 1975.

Kunvenoloko: Eŭropa Domo en Luxembourg/Pfaffenthal, 6, rue Vauban, Luksemburgio. La tuta domo kun bonaj tranokteblecoj (1- ĝis 3litaj ĉambroj), konferencejoj, kafejo ktp. estas je dispono.

Kadra temo: "Ĉu planlingvo por Eŭropo?". Okazos diversaj laborgrupoj/prelegoj i.a. pri "Historio de planlingvo en Eŭropo" - "Historio de eŭropa lingvoproblemo". - Matene (ĉefe) okazos pluraj laborgrupoj por komencantoj kaj perfektigaj kursoj.

Subtemo: "Luksemburgio - historio kaj folkloro" kun diversaj allogaĵoj kaj vizito de folklorajo "Emaischen".

Kostoj: (ege favoraj - sed nur validaj kun samtempa antaŭpago!)

sub 21 jaroj:	60 GM /	900 lfrs.
sub 25 jaroj:	65 GM /	975 lfrs.
super 25 jaroj:	80 GM /	1200 lfrs.

La kotizoj inkluzivas plenan pensionon kaj programon. Enkalkulitaj estas jam konsiderindaj ŝtataj subvencioj de Luksemburgio kaj FR Germanio. GEJ krome pagos etan vojaĝsubvencion al membroj kaj eventuale al eksterlandanoj.

Antaŭviditaj estas ankaŭ tuttaga kaj tutlanda ekskurso resp. se oni preferas, nur ĉefurba ekskurso duhora. Krome okazas Granda Paska Balo.

Aliĝojn kaj antaŭpagon de 10,- GM oni sendu al Germana Esperanto-Junularo, D-6731 St. Martin, Maikammerer Str. 21, PSchK Karlsruhe 545 77-754

Lokaj organizantoj: Beby Hopp, Albert Wickler, Hans-Dieter Platz

Ĉiu aliĝinto ricevos ĝustatempe detalan informon!

Glumarkoj favore al lepruloj kun Esperanto-teksto

Neuwied (pp) D-ro Josef Kondor, Neuwied, eldonis kvanton da bel-aspektaj glumarkoj koloraj kun Esperanto-teksto favore al lepruloj.



La glumarko surhavas la verdan stelon kaj la dulingvan enskribon: Helpu al la lepruloj Helft den Leprosen. Krome ĝi portas la adreson de gimnazio: Johannes Gymnasium 542 Lahnstein, kiu jam de multaj jaroj laboras por la lepruloj. La verda koloro volas signifi esperon, la ora koloro la sunon, kiu devos prilumi la vivon de ĉiuj lepruloj, se ili jam estas sur la vojo de resaniĝo dank' al la helpo de bonkoraj homoj tra la tuta mondo!

1folio kun 32 glumarkoj kostas 2,- GM, mendebla ĉe Libroservo Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113. Revendistoj mendu ĉe D-ro Josef Kondor, 545 Neuwied, 21, Alte Schloßstr. 25. La neta gajno estos donaco por la lepruloj!

Indiko: Al ĉi tiu numero estas aldonita aliĝilo por la Germana Esperanto-Kongreso en Oberkirch. Aliĝu tuj! Mendu la glumarkojn pri la kongreso ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Nürnberg. Krome vi trovas aldone cirkuleron 1 de EEC (Esperanto-influgrupo).

Esperanto en la radio (pp)

Vieno. El la semajna komentario de d-ro Alfred Macher de la elsendo de la 25/26 jan 75 ni citas:

Kie estas nia sukero?

"Vere interesas la popolon - speciale la hejm-mastrinojn - tute alia demando, nome: kie estas nia sukero? Evidente ne en la butikoj. Kvan-kam proksime al Vieno la suker-betoj tiel abunde prosperas, ke la sukero ĉe ni ĉiam relative malmultekostis, ekestis serioza manko je la pasinta Kristnasko. La suker-industrio ekspluatita la grandegan diferencon inter la mondmerkato kaj la enlanda prezoj per grandkvanta eksportado. La leĝan baron ĝi evitis, ekzemple, per almikso de aliaj substancoj facile re-apartigeblaj.

Sub la kondiĉo de prez-altigo, nome de 8,60 ŝilingoj al 10,10 ŝilingoj, la suker-industrio garantias senriproĉan provizadon de la aŭstria merkato. La komerc-ministro ekzamenas la pravigeblecon de tiu postulo, konfirmante, ke en ĉi tiu januaro estis liverata en Aŭstrio je 250 procentoj pli da sukero ol en la pasintjara.

Certe, konsiderinda parto de tiu kvanto estas premio por la betokulturistoj, sed la alia parto - kie ĝi estas? Ĉiu, kies fingro estas en tiu mizera afero, akuzas aliajn. La hejm-mastrinoj, konvinkite, ke sukero ree abundos tuj post kiam la prezaltigo estos konsentita, postulas efikajn elpaŝojn kontraŭ ĉiuj, kiuj fi-manipulas la dolĉan merkaton."

En la elsendo de Vieno de la 1/2 februaro 1975 estos disaŭdigita intervjuo kun f-ino Jolantha Kieres el la pola urbo Nowy Sącz en la Karpata montaro, kiu private restadas por feria tempo en Vieno.

El tiu intervjuo ni antaŭpresas kelkajn citaĵojn:

D.: Ĉu restis al vi tempo por iom ĝui ankaŭ la kulturen vivon de Vieno?

R.: Certe. Interesas min la art-trezoroj en la muzeoj, sed eĉ pli multe la vienaj muziko kaj opero. Plaĉas al mi, ke ĉi-tie oni prezentas la operojn kun la spirite konforma dekoracio, ekz. la "Geedziĝ-feston de Figaro" en delikate rokokoa medio, kiu sola vere harmonias kun la gracia muziko de Mozart.- En la kapelo de la Imperiestra Palaco mi aŭskultis diservon kantatan de la tutmonde ŝatataj "Vienaj Kant-Knaboj".

D.: Ĉu ekzistas io simila al tiu knaba ĥoro en via lando?

R.: Jes. Oni povas fari komparon kun la tiel nomataj "Najtingaloj" en la pola urbo Poznan.

D.: Certe: ne ĉiuj viaj impresoj ĉi-tie povas esti agrablaj. Kio malpli plaĉas al vi, ekzemple?

R.: Nu, antaŭ ĉio la prezo de la trambilettoj. Ses ŝilingoj por unu veturo estas ja terure! Ĉe ni tramveturo kostas unu zloton, do proksimume nur sesonon de la Viena prezo. - Kaj strange impresas min, ke en la vespero, kiam en la stratoj de polaj urboj la vivo ĝuste komenciĝas kaj ĉio vigliĝas, la Vienaj stratoj fariĝas preskaŭ tute senhomaj. Ekde la deka horo oni vidas, eĉ en ĉefaj stratoj nur du aŭ tri personojn - vaste disajn.

Komenciĝis la Sankta Jaro

Romo (pp) En unu el la januaraj elsendoj de Radio Roma en Esperanto oni povis aŭdi felietonon pri la naskiĝo de la tradicio de la Sankta Jaro. Jen el tiu elsendo mallonga citaĵo: "La papo Bonifacio la 8a, kiu ankaŭ estis originala figuro de politikisto, meze de longdaŭraj luktoj kontraŭ la romaj nobeluloj kaj la franca reĝo, klopodis vekti denove pri la religiaj aferoj (kaj, nerekte, pri Romo) la interesiĝon

(daŭrigo sur p.4)

kaj la partoprenon de la homamasoj, kiuj pro jarcentaj perturboj estis iom disiĝintaj: kaj li elpensis ion, kio stimulu la fidelulojn respondi denove al la alvoko de la kredo, kiel en la epoko de la krucmilitoj: la starigon de Sankta Jaro. La koncepto elpensita de papo Bonifaco la 8a ne estis tute nova: jam la Israela popolo, tre pli frue ol la naskigo de Kristo, celebris apartan riton ĉiun 50an jaron. Dum tiu eksterordinara jaro, anoncita per kapra korno (en la hebrea "jobel", el kio la latina "jubileum"), la tero devis ripozi, la hebreaj sklavoj reakiris liberecon, kaj la ŝuldoj estis forstrekitaĵoj. La nokton de kristnasko de 1299a, do, Bonifaco la 8a anoncis la unuan katolikan Jubileon, kies komencigo estis fiksita por la 22a de februaro 1300a. Per papa buleo oni diskonigis al la kristanaro la deziron de la Roma Eklezio gajni indulgencon (tio signifas, pardonon de la pekoj) al ĉiuj, kiuj genuos sin sur la sanktaj lokoj dum la Sankta Jaro..."

1974a statistiko el Varsovio

Varsovio (pp) Kvankam mi dekfoje aŭskultis al la sonbenda registraĵo pri la pasinta leterkesto, mi tamen ne povas garantii la ĝustecon de jena informo: Laŭ mia orela impreso Radio Varsovio, Esperanto-redakcio ricevis dum 1974 5021 korespondaĵojn el 24 landoj eŭropaj kaj deko da ekster-eŭropaj landoj. (La demando estas, ĉu la nombro estas 5021 aŭ 3021 korespondaĵoj!) Laŭ eŭropaj landoj montriĝas jena stato: Sovetunio 429, GDR 330, Finnlando 315, FRG 281 + 2 el Okcidenta Berlino, Britujo 253, Ĉeĥoslovakio 244, Hungarujo 201, Francujo 192, Nederlando 108, Italio 106. Malpli ol cent korespondaĵoj venis el jenaj landoj: Belgio 88, Svedio 76, Aŭstrio 71, Jugoslavio 63, Bulgario 55, Danlando 37, Svislando 36, Hispanujo 29, Rumanio 27; malpli ol dek korespondaĵoj venis el Norvegio 9, Portugalujo 5, Monako 2, Malto 1.

La lastdیمانĉa Esperanto-Ekspresso traktis ĉefe radiofoniajn temojn kaj speciale la laboron de la E-redakcio de Pola Radio mem. "Vizito en Kuirejo" nomiĝis la unua kontribuo laŭ artikolo en "Norda Gazeto" de L. Giloteaux. Dum 4 horoj la franca aŭskultanta observis la laboron de la redakcio je iu sabato, je la "plej streĉa tago de la semajno". "Vi ja laboras kiel tradukmaŝinoj" komentis L. Giloteaux; "ne pli bone", estis la tuja respondo. - Andrzej Pettyn intervjuis la "aŭskultanton de la jaro 1974", Olavi Kalevaa el Turku pri la perfektigado de la lingvokono kaj la rolo en tio de Pola Radio. Laŭ Kalevaa Pola Radio estas la plej bona daŭriga kurso de Esperanto. - Andrzej Pettyn recenzis la parton "Esperanto en radiofonio" el la CED-libro "Esperanto en perspektivo". Fine oni povis aŭdi la rubrikon "Niaj aŭskultantoj sciigas."

30a datreveno de la liberigo de Auschwitz

La 27an de januaro pasis la 30a datreveno de la liberigo de la iama germana koncentrejo Auschwitz. Kaj la rememoroj pri tiuj teruraj krimaj agoj respeguliĝas en la nunaj elsendoj de Pola Radio. Liberigaj datrevenoj ja abundas: Liberigo de Varsovio, liberigo de Krakovo, liberigo de Auschwitz....Dum 1975 Pollando celebras la 30an datrevenon de sia liberigo. Kaj enĉi tiuj tagoj montriĝas, ke Auschwitz disiĝas nin, la polojn kaj la germanojn, ke ni estas ankoraŭ malproksime de la stato de normalaj rilatoj inter Pollando kaj FRG. Kaj ankaŭ la estonteco ne estas multpromesa. Tamen ni simplaj homoj, ni esperantistoj, ne perdu la esperon. Estus tro simpla kaj tro malkara afero - por germana esperantisto - per vortoj kondamni tiun "Auschwitzan spiriton". Per agoj ni devas peni por serĉi kaj trovi tiun malfacilan vojeton kondukanta al normaligado de la rilatoj inter Pollando kaj FRG.

Radio Sofio disaŭdigis dimanĉe i.a pri kor-operacioj en Bulgario kaj disaŭdigis muzikan programon.

Berno parolis okaze de la 100a datreveno de Albert Schweitzer pri la Nobel-pacpremio kaj la agado de Nobel.



En la Suplemento 3/74 de la Bulteno de la Eŭropaj Komunumoj aperis la 'Programo por Eŭropa Edukado' de Prof-o D-ro R. Dahrendorf (ĝis Septembro 1974 Komisiito por Edukado).

Inter liaj diversaj punktoj staras unu elstare grava, *ki el plibonigi la instruadon de fremdaj lingvoj.*

Komentoj pri ĉi tiu punkto estas invitatataj de edukistoj, edukaj organizoj, sindikatoj, kulturaj organizoj, k.t.p.

ESPERANTISTOJ estas, do, urĝe petataj labori, en la kadro de la organizoj (ne-Esperantistaj) al kiuj ili apartenas – virinaj asocioj, sindikatoj, kulturaj aŭ profesiaj organizoj, religiaj, junularaj aŭ aliaj organizoj – por ke la demando pri lingvo-instruado estu pritraktita. Oni ne nur stimulu intereson sed ankaŭ proponu la inviton de prelegantoj pri la temo (Esperantistoj, se eble, kiuj kapablas paroli ĝenerale pri lingvo-instruado kaj la lingvo-problemo).

Oni instigu la sendadon de rezolucioj al la centraj komitatoj de siaj organizoj kun peto, ke ili estu transdonitaj, en la nomo de la organizo, al la Eduka Fakto de la Eŭropaj Komunumoj en Bruselo.

La tri eblecoj estas la jenaj:

1. Oni daŭrigu la nunan ĥaosan situacion, instruante unu lingvon en unu loko kaj alian en alia loko – ofte hazarda afero laŭ la havebleco de instruistoj.
2. Oni decidu, inter eŭropaj landoj, ke unu aŭ pli da lingvoj estu /a solaj oficialaj lingvoj por la eksteraj rilatoj inter la landoj de Eŭropo; kaj tiujn lingvojn oni nepre instruu al ĉiuj lernantoj en ĉiuj lernejoj. Sed kiujn lingvojn oni elektu....? .
3. Oni adoptu la neŭtralan solvon de Esperanto.

En la rezolucioj oni rekomendu:

1. Ke la Eduka Fakto de la Eŭropaj Komunumoj starigu laborgrupon por objektivite studi la diversajn eblecojn.
2. La starigon de oficiala eksperimento en ĉiuj eŭropaj landoj por studi la praktikan valoron de Esperanto-instruado. La argumentoj favoraj al Esperanto-instruado troviĝas jam en la Dok. AS/CS(8)2 16 Apr. 1956, de la Eŭropa Konsilantaro en Strasbourĝ. Tiu dokumento estas havebla de Strasbourĝ laŭ peto.

INFORMADU Esperanto-Influgrupon pri la progreso de via rezolucio.

Se vi bezonas helpon aŭ konsilon pri agado kun la Eduka Fakto de la Eŭropaj Komunumoj kontaktu vian Landan Repezantanton. La nomo de via Repezantanto estas:—

Belgujo	Rene Jacobs, Rue General Eenens 94, 1030 Bruxelles.
Britujo	Ron Coverson, 601 Duncan House, Dolphin Square London, SW 1
Danlando	Ib Schleicher, Ved Bellahoj 21.13, DK 2700 Kopenhago
Francujo	D-ro A Albault, 6 Rue de Douaumont, F 31200 Toulouse
Germanujo	U J Moritz, D 519 Stolberg 8, Feldstrasse 38
Irlando	P J O'Reilly, Monksilver, Howth Summit, Dublin
Italio	D-ro U Stoppoloni, Via Guerrezzi 18, I-51100 Pistoia.
Luksemburgo	Marcel Ries, 25 Rue Gaffelt, Dudelange

Noto: Ĉi tiun cirkuleron verkis s-ro Raif Markarian de Britujo. Se vi havas sugestojn por la enhavo de venontaj cirkuleroj, bonvolu sendi ilin al Esperanto-Influgrupo. Dankon.

PRI ESPERANTO-INFLUGRUPU

CELOJ Instigi kaj helpi la fondon kaj la efektivan utiligon de influgrupaj organizoj por Esperanto tra la mondo.

Instigi kaj helpi persvadi organizojn de la Eŭropaj Komunumoj akcepti Esperanton kiel oficialan lingvon.

Esperanto-Influgrupo estis fondita por instigi premagadon pri Esperanto je registaroj tra la mondo. En Britujo, Influgrupo fondigis Esperantan Parlamentan Grupon de preskaŭ 50 parlamentanoj. Dum la venonta jaro Influgrupo, per via helpo, esperas fondigi Parlamentan Grupon en la Eŭropa Parlamento. Se vi persone konas parlamentanton, informu Esperanto-Influgrupon. Li eblas helpi fondigi Landan Parlamentan Grupon.

Esperanto-Influgrupo eldonas cirkulerojn Esperantalingve kaj Anglalingve. Se vi volas havi cirkuleron en via nacia lingvo sendu malnetan tekston de la cirkulero al Influgrupo.

FINANCO

Esperanto-Influgrupo ne estas parto de nacia asocio. La mono por la kosto de cirkuleroj estas donacata de esperantistoj, kiuj subtenas la celojn de la organizo. Nuntempe, oni estas preskaŭ certa, ke la organizo ne havas sufiĉan monon por presi alian cirkuleron. Donu, mi petas, iom da mono por helpi al parlamenta premagado.

Sendu per: Ĉekoj (Ĉiuj ĉekoj enkasigeblaj en Britujo), Monbiletoj (Ŝangeblaj en Britujo), Poŝtmandatoj (sterlingaj aŭ internaciaj).

Eldonis Esperanto-Influgrupo (Reg. 1889795) 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, Britujo.



Richtpreise Sommer 1974 :
Zimmer ohne Bad ca. DM 17,--
Zimmer mit Bad
oder Dusche ca. DM 20,--
pro Person

Inklusivpreise für Übernachtung
und Frühstück.

53. DEUTSCHER ESPERANTO-KONGRESS

Pfingsten 1975 . Oberkirch

Zimmer - Bestellung

Name des Gastes :

Postanschrift :

.....

Freitag 16. Mai 1975

Samstag 17. Mai 1975

Pfingstsonntag 18. Mai 1975

Pfingstmontag 19. Mai 1975

Dienstag 20. Mai 1975

Mittwoch 21. Mai 1975

Tag der Anreise :

Tag der Abreise :

Bitte kreuzen Sie Ihre Wünsche deutlich an :

Einbettzimmer

Zweibettzimmer

Dreibettzimmer

Bad oder Dusche ja nein

Anreise voraussichtlich mit PKW

Bahn oder Bus

Datum :

Unterschrift :

OBERKIRCH i n v i t a s v i n

partopreni la 53an Germanan Esperanto-Kongreson en la belega pejzaĝo de la Nigra Arbaro. Ek al Oberkirch dum pentekosto 1975. Ne hezitu tuj aliĝi.

Esperanto-Grupo Oberkirch

53a GERMANA ESPERANTO-KONGRESO

17 a ĝis 20a de majo 1975 (pentekosto)

Adreso : Esperanto, 7602 Oberkirch, Lohmühlweg 1

Kontoj : Esperanto-Gruppe Oberkirch e. V.

Deutsche Bank AG, Filiale Oberkirch

(BLZ 664 700 35) Konto 701 227

Postscheck Karlsruhe Konto Nr. 473 31-757

A L I Ĝ I L O

Kongresan(in)o
s-ro/s-ino/f-ino

Edz(in)o
s-ro/s-ino

Familia nomo
Individua nomo
Kompleta adreso
.....

<u>Kotizoj</u>	Ĝis 31.1.75	Ekde 1.2.75	Pago
Kongresan(in)o	20,--	23,--
Edz(in)o	12,--	15,--
Studento/lernanto ĝis 25jara	12,--	15,--
Donaco al la kongresa kazo		

La sumon mi sendas samtempe . Sumo: =====

Se estas sufiĉe de interesuloj, okazos tuttaga ekskurso per aŭtobusoj tra la Nigra Arbaro al la Ŝvaba Juraso, mardon la 20an de majo.

Mi/ni supozeble
partoprenos

Mi/ni supozeble
ne partoprenos

Dato:

Subskribo :